## Lerneja agado en la ILEI Konferenco en Matanzas 2010

Rezultoj de la kunveno de la laborgrupo pri lerneja agado.

Necesas revigligi la Lernejan Komisionon per konkretaj projektoj.

Landoj sekcioj havas diversajn problemojn pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn

Utilos havi konsililon, kun ideoj pri kiel persvadi ŝtatajn instancojn, parlamentanojn kaj lernejajn direktorojn pri la valoro de E-o en iliaj programoj. Tio povos esti en la retejo de ILEI.

Rilataj demandoj:

Ĉu ni proponu E-on kiel gravan fakon en si mem, aŭ kiel tre utilan ilon por enkonduki lingvojn kaj kulturojn?

Ĉu studantoj povos oficiale ricevi notojn?

Helpiloj por interkultura gruplaboro estas bezonataj. Kiel produkti materialon? Kion fari kun ĝi? Necesas peti aliajn esperantistojn helpi en la konkretigo de interkultura aktivo. Radojica Petrović jam multe prilaboras interkulturon, kaj Leysester Miró interesiĝas.

Farindaj (-endaj?) taskoj:

1. Formi novan Lernajan Komisionon kun eventualaj ekstraj helpantoj. Julián Hernández estas la respondeca estrarano, sed ne necese la ĉefgvidanto de la komisiono. Leysester Miró estas nova volontulo apude de la komisiono.
2. Invitu la nunajn komisionanojn, la homojn en la ILEI konferenco, kaj aliajn.
3. Informiĝu pri la nuna stato de lerneja agado en Esperantujo:
   a) Kia estas la nun statuso de E-o en diversaj landoj? (oficiale en la ŝtata sistemo, tolerata, ktp)
   b) Statistikoj pri nuna instruado en lernejoj – helpe de edukado.net
   c) Kiujn rimedojn esperantistoj uzas por persvadi pri la enkonduko de E-o en lernejojn? Kiuj sukcesas en la diversaj sistemoj? Aliaj eblaj vojoj?
4. Kreu konsililon kaj sendu al la hejmpaĝo de ILEI. Devas esti unu respondeca redaktoro de la konsililo, kun helpantoj.
5. Provizi liston de fondusoj por subteni projektojn (kaj konsilon, kiel peti la subtenon.)
6. Interkultura agado.

Protokolis: Agneta Emanuelsson, Svedio.